

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ☆ 3/2002

Dumonata bulteno publikigata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ☆ Junio 2002

Kiel mi Esperantistiĝis (kaj kion mi lernis ...)

de Taylor Francis

Look inside for:

President's message

Pri la multsignifeco de DE

El la CO

NOREK

Amaso da novaj libroj!!!

Amaso da korespondpetoj

Okemo

Look next issue for:

Ken Price on the use and misuse of "ke" ...

Reports on the ELNA Congress...

Report from this year's NASK...

...and pictures from both!

Mi estis ĉiam amatora lingvisto. Ĉe la mezlernejo mi studis la germanan lingvon. Mia lingva instruistino diris, ke ĉio sciebla ne estas en unu lingvo sciebla. Do, ĉe la universitato mi plustudis la germanan, dum sole, mi lernis iomete la rusan kaj la ĉinan lingvojn. Post multaj jaroj, kiam mi restudis universitate, mi lernis la grekan lingvon kaj iome la hebrean. (Unue, mi studis komputilan sciencan ĉe la universitato, kaj due, mi studis teologion.) Multfoje, kiel junulo, mi provis krei mian propran sekretan lingvon, sed ili ne funkciis ĉar mi havis nenion kun kiu mi povis kunparoli.

En la jaro 1999, mi decidis esplori la lingvon Esperanto, pri kiu mi sciis preskaŭ nenion kaj aŭdis nur iomete. (Mi sciis ke Esperanto ekzistas ĉar mi legadis librojn pri multaj lingvoj.) Mi trovis la 10-lecionan kurson en la reto. Post la unua leciono mi amegas la lingvon kaj ĝian simplecon kaj fortecon. Mi studis la tutan kursaron dum unu semajno. Tuj poste mi mendis la libron *Teach Yourself Esperanto* kun la sonbendoj de Amazon.com. Ĝi venis post ne multaj tagoj kaj mi komencis legi ĝin.

Nun mi decidis provi mian lingvokapablon en la reto. Mi trovis la novaĵgrupon `soc.culture.esperanto` kaj sendis kelkajn komencajn mesaĝojn. Iuj personoj tie

tuj atakis miajn erarojn, ne por helpi, sed nur por ataki. Mi tuj decidis ke mi ne volas uzi la lingvon de tiaj malĝentilegaj homoj. Mi fermis la librojn kaj haltigis miajn studojn. Tiun aŭtunon, mi iris al Nikaragvo, do mi studis la hispanan lingvon iome.

En la somero de jaro 2001, mi revidis la libron *Teach Yourself* ĉe la libroŝranko kaj volis legi ĝin denove. Mi faris tion sed mi ne uzis la reton por konversacii. Mi vizitis la retpaĝon de ELNA por serĉi lokajn Esperanto-parolantojn. Mi trovis homon kiu loĝas ne for de mi, kaj kun li mi malkovris tutan komunumon de Esperanto-parolantoj. Nun por mi estas Esperanto bona sperto.

Kvankam mi ne kreis Esperanton, ĝi estas por mi sonĝo kiu nun vivas. Mi ĉiam volis simplan komunikan metodon por ĉiuj. Esperanto estas tia metodo. Ĝi estas facile lernebla kaj forte uzebla. Mi kredas ke se ĉiu lernos iom, tiam la mondo pliboniĝos.

Vi trovos kelkajn malĝentilajn personojn en Esperantujo, sed ili ne estas la kutimuloj. Ĉiu kulturo havas siajn malbelajn aferojn, sed veraj Esperantistoj estas amikaj kaj volas helpi la novajn esperantistojn. Nun mi estas fiera esti esperantisto kaj ano de la mondsocio de Esperanto-parolantoj.

Esperanto League for North America
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO
☎510/653-0998; 📠510/653-1468
✉elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: Alexander Shlafer
Vice President/Vicprezidanto: Phil Dorcas
Secretary/Sekretario: Ellen M Eddy
Treasurer/Kasisto: William B Harris
Other Board Members/Aliaj estraranoj: Thomas Alexander, Don Coleman, Peggy Dolter, D Gary Grady, Angela Harlow, Orlando E Raola, Jacob Schwartz, Derek Roff, Tim Westover, David Wolff

Director, Central Office/Direktoro de la Centra Oficejo: Joel Brozovsky
Vice Director, Central Office/Vicdirektoro de la Centra Oficejo: Donald Harlow

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America
Dumonata bulteno publikigata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Vol. 38, No. 3

ISSN 1056-0297

Editor/Redaktoro: Don Harlow
☎ 510/653-0998; 📠 510/653-1468
✉ donh@esperanto-usa.org

Materials for esperanto usa should be sent to/Materialojn por esperanto usa oni sendu al:

esperanto USA

PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/ USONO

or by e-mail/aŭ e-poŝte al:
e-usa@esperanto-usa.org

The opinions expressed in this bulletin are those of the authors, and don't necessarily represent the point of view of ELNA or its bulletin/La opinioj esprimitaj en ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de ELNA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is permitted, provided that due credit is given, and a copy of the reprinted material is sent to ELNA/Estas permesate reaperigi materialojn el ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj ke oni sendu ekzempleron de la republikigita materialo al ELNA.

Deadline for the next issue/Limdato por la sekva numero: 27.09.2002

Sez the Prez

Saluton ĉiuj,

Housekeeping items: An Ege Bone! to Joel Brozovsky. Joel worked with a local reporter to produce an excellent newspaper article about Esperanto and ELNA.

My thanks to long-standing Board members Derek Roff and Grant Goodall, who have decided not to run for reelection. They have both been friends to me as well as strong supporters of ELNA for many years. I expect to see them staying active.

Also, our thanks to Dr. Ralph Lewin and to Liz Raible, who both resigned from the Board in June. Dr. Lewin decided that he was too overtaxed to handle Board responsibilities properly, and Liz is currently completely occupied with her studies. We appreciate their work and wish them all the best.

It's been six long years.

This is my 30th column in EoUSA. The first one was two jobs ago. One area-code change ago. Two e-mail address changes ago.

ELNA has seen successes and failures during those years. It's been one of the most frustrating experiences of my life — partly because I believe so strongly in the potential of Esperanto, and in the need for a strong ELNA to turn that potential into reality. Some of the successes and failures that I've witnessed or worked on:

Successes: 800-ESPERANTO.
www.esperanto-usa.org (and online

book catalog!) (now with posters and Board Member reports!). Paid EoUSA editor (and far more regular!). New CO Director and Vice-Director. elna-anoncoj@yahoo.com. Patron membership. And Steve "Bucknaked" Belant for his unforgettable entry in the Oratory Contest at the 1997 LK. Doubled member book rebate to 10%. Handbook for Local Groups and Beer Poster. The passing of Bill and Cathy Schulze. The Klara Zamenhof Fund (originally Roff Individuaj Rabataj Apogoj, or Roff IRAs). A double-hernia operation and a Hell of a lot of gray hairs. Project NOVA. BigmOuth. The "Five Most Wanted." *Nouvorka Prismo's* 100th issue. September 11th. And I've sent out 43 "Ege Bone!"s to Esperantists who have, in one way or another, done something Really Good for our Movement. (Including a number of past and current Board Members and now two Ege Bone!s to our CO Director.)

Failures: We still don't have active committees for local groups or for fundraising. Our publicity efforts are much better than before, but still nowhere near where they should be. I've been unable to fix our long-standing financial problems. And every task in the Five Most Wanted is (since these have not been filled) a failure, in a sense.

In my first column, I wrote: "As an activist in the Movement for over fifteen years, I have often been asked, 'Why hasn't Esperanto succeeded yet?' The answer is not that Esperanto is somehow lacking. The answer is that Esperanto organizations are lacking. In particular, ELNA lacks human and financial resources; local groups lack resources and expertise; and because of

daŭrigota sur paĝo 5 (PREZ)

NEW MEMBERS Mar.-Apr. 2002

Ni volas bonvenigi al ELNA la jenajn novajn membrojn de la asocio:

Dennis Baum (Oakland, CA)
Diana Brown (Winchester, MA)
Vivian Burns (Fremont, CA)
Peter Catlin (Webster, NY)
Iain Davis kaj Rachel Ruhlen (Columbia, MO)
Michael Y. Erlewine (Saint Paul, MN)
Ivan Gatchik (Houston, TX)
Dana Kieser (Portland, OR)
Thomas Martin (Yokohama, JAPAN)

Lawrence Nagy (Metuchen, NJ)
Aaron Peterson (Pullman, WA)
Scott Redd (Omaha, NE)
Heather Shelly (Webster, TX)
Joey Stanford (Longmont, CO)
Alvaro Tirado (West New York, NY)
Michael Watson (Shreveport, LA)
Paul Wick (Sacramento, CA)
Krystal Williams (Davis, CA)

PRI LA MULTSIGNIFECO DE DE de Maurice Wittenberg

Kiel ĉiuj prepozicioj en Esperanto, *de* havas nur unu bazan signifon, sed ĉi tiu prepozicio estas uzata en tiom da funkcioj, ke ĝia signifo povas esti iafoje ambigua. La baza signifo de *de* estas origino aŭ posedo, kvazaŭ estus ligstreko venanta de la vorto, kiun ĝi regas, al la vorto determinata de la prepozitivo. Ekzemple, en *la domo de Petro*, la determinata vorto estas *domo*, kaj *de* ligas *Petron*, la vorton regatan de ĝi, kun *domo*, ĉi-tiuokaze montrante, ke la domo apartenas al Petro.

Konsideru la sekvantajn frazojn:

1) *Li estis mortigita de urso.* 2) *Antaŭ mortigo de urso, ne vendu ĝian felon* [el la *Proverbaro*]. En la du frazoj, *de* ŝajnas havi preskaŭ malajn signifojn. En la unua ĝi indikas, ke la mortigo venis de la urso. En la dua, ke la mortigo estas suferita de la urso. Sed ambaŭ frazoj estas tute neambigua. Kial?

En la unua frazo, la konvencio estas, ke *de* indikas la aganton post pasiva verbo. En la dua, la konvencio estas, ke *de* indikas la suferanton de la ago, priskribita de la verba substantivo; en la angla tio estas nomata “the objective genitive”.

Nun konsideru la frazon, *Tiuj estas la libroj, ricevitaj de mi de mia amiko*. Kiu ricevis la librojn kaj kiu donis ilin? Oni ne povas scii de tiu frazo. Kiel oni solvas ĉi tiun problemon?

La solvon donis Zamenhof mem en *Lingvaj Respondoj*. En respondo 131 Zamenhof diras: ”Post pasivaj participoj la prepozicio ‘de’ ĉiam montras nur la *aganton*: ekzemple, en la frazo ‘la libro estas legata de Adolfo’ la prepozicio ‘de’ montras, ke Adolfo estas la aganto, kiu legas. Uzi post pasiva participo simplan prepozicion ‘de’ en ia alia senco ni devas ĉiam eviti.

Ekzemple, anstataŭ la frazo: ‘lia propra poŝhorlogho estis ŝtelita de la hoko, sur kiu li ordinaro pendigis ĝin’ estus pli bone diri ‘for de la hoko...’. Anstataŭ ‘ŝi troviĝis ŝirmata for de liaj entreprenoj’ mi konsilus diri ‘kontraŭ’ liaj entreprenoj.’ — Nun ni scias, kion fari. Kaj por traduki la anglan vorton “from” en ĉi tiuj cirkonstancoj, estas laŭcele uzi *for de*, *disde*, aŭ *el de*. *Disde* preskaŭ taŭgas por ĝenerala uzado, sed ĝi subkomprenigas al mi ian nevolontecon flanke de la estaĵo, de kiu oni prenas ion; ekzemple, *La idoj de la ursino estis prenataj disde ĝi de la ĉasistoj*.

Tiel, se mi ricevis la librojn kaj mia amiko donis ilin, la prepozitivo *de mi* estas en ordo, ĉar mi estis la ricevinto, tial formale la aginto, sed la prepozitivo *de mia amiko* devas esti modifita, ĉi-tiuokaze, miaopinie, al *el de mia amiko*: *Tiuj estas la libroj, ricevitaj de mi el de mia amiko*. Sed tiu mia frazo estas tute nerealista. Oni preskaŭ neniam vortigus la ideon tiel; oni prefere dirus, *Tiuj estas la libroj, kiujn mi ricevis de mia amiko*. Se oni ja indikas la aganton, kial uzi la pasivon, kiu diras la samon kiel la aktivo, sed per pli da vortoj? La pasivo pli utilas, kiam oni ne volas indiki la aganton. Rimarku ankaŭ, ke en Esperanto oni ĉiam disponas la akuzativon, kiu permesas la vortordon de la pasivo, sen ĝia uzo: *Mi estis surprizita de tiu okazo*, pasivo, egalas la frazon, *Min surprizis tiu okazo*, aktivo.

Nun konsideru la frazon (el la *Plena Analiza Gramatiko*), *La pastro dediĉis la preĝejon al Sankta Miĥaelo*. Se oni volas substantivigi ĉi tiun frazon, oni povus diri, *la dediĉo de la preĝejo al Sankta Miĥaelo de la pastro*. Sed kio okazus, se oni intershangus la

prepozitivojn, kaj dirus, *la dediĉo de la pastro al Sankta Miĥaelo de la preĝejo*? Oni eble pensus, ke la pastro estis dediĉita iel al Sankta Miĥaelo de la preĝejaj oficistoj. Estas bezonata ia rimedo distingi la aganton disde la suferanto de la ago. Kiel ni vidis, la normala uzo de la de-prepozitivo en tiaj frazeroj estas por indiki la suferanton de la ago; do, *de la preĝejo* povas resti tiel. La prepozitivo *de la pastro* devas esti modifita.

La *Plena Analiza Gramatiko* (Sekcio 138) donas la sekvantan interesan informon pri la solvo de ĉi tiu problemo: ”Poste Zamenhof iniciatis la uzon de **flanke de** por tiu funkcio; sed, ĉar tiu prepoziciaĵo povas ankoraŭ signifi ‘aparte de’ (t.e. preskaŭ la malon), la solvo ankoraŭ ne estis kontentiga. Sed ĝi montris la vojon, kaj fine, en 1926, Grosjean-Maupin konvinkis la SAT-gazetojn sisteme uzi, en tiu okazo, **fare de**, kiu enradikiĝis en la laborista literaturo: *la ekspluatado de la homo fare de la homo; dum vizito al nia sidejo fare de tiuj fremdaj kolegoj*.”

Do la frazero pri la dediĉo de la preĝejo devus esti *la dediĉo de la preĝejo al Sankta Miĥaelo fare de la pastro*.

Konklude, oni povas vidi, ke la multsignifeco de *de* tute ne kaŭzas problemojn. Se la kunteksto ne klare montras la signifon de ĉi tiu prepozicio, oni povas precizigi ĝian signifon per aldono de aliaj vortoj, uzante *for de*, *disde*, *el de*, *fare de*, ktp. Nu, mi esperas, ke ĉiuj duboj pri la uzo de *de* estis forigitaj de mi for de la mensoj de miaj legantoj per ĉi tiu artikolo. Mi opinias, ke la priskribo de ĉi tiu afero fare de mi donis al ili kelkajn bonajn konsilojn.

Kien ELNA Post la 50a Jaro?

La jubilea kvindeka jaro de ELNA estas taŭga okazo rerigardi la organizaĵon, ĝiajn historion, nunan staton, kaj prognozojn por la oso. Kaj, ne surprize, ĝuste tion ni faras.

La jubilea 50-a ELNA-kongreso estis ia kulmino de tiu sintakso, kvankam ne la fino. Okaze de la kongreso ELNA eldonis en angla lingvo libron pri la historio de ELNA kompilitan de William R. Harmon: *A History of the Esperanto League for North America, Inc.* Tiu 64-paĝa libro estas tre valora referencolibro pri ELNA kaj la usona Esperanto-movado de la lasta jarcentduono. Ĉiufoje kiam mi malfermas ĝin, mi trovas ion interesan kiu tiras mian atenton, kaj malfaciligas forlason de la libro. La libron ricevis jam ĉiu kongresano, kaj oni povas aĉeti ĝin en la libroservo.

Ni rigardas ankaŭ la nunan staton de ELNA. Pri la agado de la lasta jaro oni povas legi en la jarraportoj de komisiitoj, komisionoj, komitatoj, ktp. Tiujn jarraportojn ni kolektis kaj eldonis okaze de la kongreso, kaj kongresanoj jam ricevis ilin surpapere. Ĉiu membro de ELNA rajtas ricevi ilin senpage, kaj mi kuraĝigas ĉiujn tralegi ilin. Ili donas bonan bildon de la agadoj, kaj mankoj de agadoj, de nia movado. Ili troveblas en la interreto ĉe la ttt-ejo <<http://esperanto-usa.hypermart.net/raportoj/jarraportoj2002/>>. Ĝi estas ŝlosita al la publiko, sed ELNA-membroj rajtas libere rigardi kaj ŝuti ĝin. Por atingi ĝin, uzu la identecon **membro** kaj la ŝlosilvorton **elnagado**.

Se vi preferas ricevi la jarraportaron sur papero per paperpoŝto, bv. peti tion al la Centra Oficejo. Ĝi estas senpaga al membroj de ELNA.

Tre grava parto de la rigardo al la nuna stato de ELNA temas pri la financa stato. Dum preskaŭ du jaroj ni ne havis aktualan bildon de la financoj de ELNA, pro manko de funkcia kaskisto, kaj pro la tempo necesa por la nova kaskisto ekkompreni kaj ordigi la malordon lasitan pro tio. Mi ne povas troigi la dankojn al nia nuna kaskisto, William Harris, kiu penegis ordigi la kontojn kaj librotendadon de ELNA, kaj finfine faris

bone uzeblajn raportojn per kiuj la estraro (kaj la membroj) povas kompreni la veran financon staton.

Kia estas la financa stato de ELNA? Nu, ĝi ne estas nun katastrofa, sed ELNA de jardeko sekvas vojon evidente kondukantan al katastrofo, kaj se ni daŭrigus same, la katastrofo venos tre baldaŭ. Temas pri vera katastrofo, kiu postulus maldungon de oficisto, fermon de pluraj el la servoj de ELNA, kun verŝajne responda drasta malkresko de la Esperanto-aktiveco en Usono. Neniu el ni deziras tion, kompreneble. Tial, la plimulton el la tempo de la estrarkunsido oni dediĉis al tiu problemo. Jen, ni ekrigardas al la oso.

La problemo estas, simpligite, jena: La oficejo, oficistoj, kaj servoj de ELNA kostas multe pli ol ELNA enspezas per kotizoj, vendoj, rento, kaj regulaj donacoj. La diferencon oni pagis el kapitalo, kies celo estis doni renton por daŭre subteni la agadon de ELNA. Tiel la libera kapitalo ĉiujare malmultiĝas, kaj baldaŭ — post du aŭ tri jaroj — plene malaperos, se ni ne ŝanĝos la vojon.

Necesas malpliigi la elspezojn aŭ pliigi la enspezojn, aŭ ambaŭ. La fakto ke kotizoj ne sufiĉas por kovri la kostojn estas ne surprize — en ĉi tia organizaĵo, kutime kotizoj solaj ne sufiĉas. Pli multaj membroj certe helpus. Ni do planas (kaj jam komencis) pli vigle klopodi varbi membrojn. Niaj klopodoj jam donas kuraĝigan rezulton: la membronombro fine de junio en 2002 estas pli ol la lastjara 694 je la fino de junio, 2001. Tio promesas rompi la konstantan malpliigon de membronombro kiun travivis ELNA dum la lasta jardeko. Tio certe estas bona kaj kuraĝiga indiko, sed ankoraŭ longe for de solvo al la financa paneo. Eĉ duobligo de la membronombro ne sufiĉus por plene solvi la financon krizon. Ni bezonas pliajn membrojn, sed ni bezonas ankaŭ pli ol tio: ni bezonas mondonacojn. ELNA simple ne povas ekzisti kiel konstantserva organizaĵo sen mondonacoj.

Ni en la oficejo trovas manierojn ŝpari monon laŭeble, sed tio temas pri relative malgrandaj partoj de la buĝeto.

Ĝi certe helpas — neniu gajnas per malŝparo. Tamen, ne estis multa malŝparo de mono, kaj ne eblas ŝpari multe sen forigo de servoj. La plej granda unuopa elspezo estas la salajroj de la du oficistoj, direktoro kaj vicdirektoro de la oficejo. La plej simpla maniero ekvilibri la buĝeton estus forigi unu oficiston, ĉar proksimume tiom estas la manko de enspezo en unu jaro. Sed, estas simpla fakto ke unu homo ne povas fari tion kiun nun faras du homoj sin pene dediĉantaj al la laboro, ofte uzante multe pli ol la normala 40-hora semajno. Tiu “solvo” certe kondukus al drasta malpliigo de la servoj, kaj malkresko de la Esperanto-movado en Usono.

Oni diskutis la eblon simple malpliigi la salajrojn. Tamen, la nunaj salajroj de la oficistoj, kvankam sufiĉe por modeste vivteni unuopulon, estas malpli ol duono de la salajroj kiujn ni povus ricevi se ni laborus en komerca firmao. Tiusence, ni dungitoj jam “donacas” duonon de nia unta salajro por la privilegio labori por ELNA. La estraro decidis lasi la salajrojn samaj kiel lastjare.

Sed, se ni ne sukcesas grande pliigi la enspezojn, necesos duonigi la stabon. La estraro en Sakramento (kaj per retroŝta diskutado antaŭ la kongreso) diskutis tiun eblon: ĉu ni devas tuj maldungi unu oficiston? Fine la estraro decidis prokrasti tian drastan paŝon ĝis februaro de 2003. Oni faris buĝeton kiu inkluzivas ambaŭ oficistojn ĝis tiu monato (la buĝeto estas por fiska jaro, de aprilo 1 ĝis marto 31), kun la jena kondiĉo: Se la financa stato ne pliboniĝas ĝis tiam, oni maldungos oficiston, sed se estas sufiĉa pliboniĝo de la enspezoj, oni daŭrigos la nunan funkciadon de la oficejo plu, ĝis la fino de la fiska jaro, kiam necesos decidi pri nova buĝeto.

Do, la krizo estas prokrastita, por doni al ni — tio estas, al ELNA, ĉiuj el ni — iom da tempo ekagi por solvi la problemon.

Oficistoj kaj estraranoj penas trovi solvojn, kaj ili ĉiuj mem donacos monon al ELNA. Sed, por eliri el nia krizo, necesos simila penado de la membroj. La pluekzisto de ELNA kiel ni konas ĝin dependas je la kunagado

de ni ĉiuj. Kiel helpi? Jen kelkaj sugestoj, kiuj certe ne konsistigas kompletan liston.

- Donaci monon al la ĝenerala kaso de ELNA, (por eliri el la nuna krizo), aŭ al la Capital Endowment Fund (por pli daŭra solvo de la problemoj).

- Aranĝi testamenton, por heredigi ion al ELNA. Se oni mortas sen testamento, la ŝtato kutime prenas la plimulton el la heredaĵo, do nepre starigu testamenton. Se vi interesiĝas pri tio, kontaktu s-ron William Harmon, kiu povas diskrete konsili vin pri testamentoj, kaj helpi aranĝi ĝin, kun asisto de tiaj fakuloj kun kiuj li kunlaboras.

- Realigi al ELNA en unu el la subtenaj kategorioj kun kotizo pli alta ol tiu de simpla individua membro. Detaloj pri tio aperos kun la nova aliĝilo por 2003 post la somero.

- Se vi laboras ĉe firmao kiu kundonacas monon al senprofitcelaj organizoj kune kun la dungitoj, profiti tiun eblon kiam vi donacas monon al ELNA. Eĉ kotizon oni povas plimultigi tiel, ĉar kotizo al ELNA, same kiel aliaj donacoj, estas, laŭ jura vidpunkto, donaco deprenebla el la enspezo raportata al la federa impostservo (IRS). ELNA havas la necesan statuson priskribitan en 501 (c) 3. Petu informojn kaj formularon de via dunginto pri "matching gifts".

- Aboni pliajn gazetojn pere de ELNA.

- Aĉeti pliajn librojn, sonbendojn, vidbendojn, ktp ĉe la libroservo de ELNA.

- Agadi en via loka regiono por disvastigi Esperanton, kaj kuraĝigi samideanojn membriĝi en ELNA kaj aĉetumi ĉe nia libroservo.

- Helpi ELNA-n serĉi fontojn de mono. Tia helpo povas esti en diversaj formoj:

- Volontuli tempon traserĉi la eblojn kaj skribi proponojn.

- Helpi peri kontakton al eventuala mecenato, se vi havas konaton tian. Homa kontakto ofte valoras pli ol nur idea propono.

- Doni ideojn pri kiel trovi monfontojn aŭ mecenatojn.

La bezonoj nuna (en la ĝenerala fonduso) kaj plu daŭra (en la kapitala fonduso) estas realaj. Mi kredas ke eblos solvi la financon problemon per kunlaboro de samideanoj tra la lando. Mi certe esperas ke ni sukcesos daŭrigi la servojn de ELNA kaj plivigli la Esperanto-movadon en Usono akorde kun ĝia kresko en aliaj partoj de la mondo. Ni kunlaboru por la komuna celo!

NOREK

La Nord-Okcidenta Esperanto-Konferenco okazos en Sidney, BC, inter la 27-a kaj 29-a de septembro 2002. La Kanada kantistino, Joelle Rabu, prezentos koncerton el la kantoj de Edith Piaf kaj el sia propre verkita repetuaro, kompreneble en Esperanto. Ĝi okazos sabaton vespere en la urba teatro "Charlie White".

Precizaj informoj sekvas:

Temo de la konferenco: La temo de U.N. "La jaro de la Arbaroj". Kiel rilatas tiu temo al vi kaj al la Esperantistoj en diversaj landoj?

Adreso de la Konferenca Tranoktejo: La Airport Travelodge, 2250 Beacon Avenue, Sidney, BC, V8L 1X1. senpaga telefonsistemo: 1-866-656-1176. aŭ 1-800-578-7878. Petu la specialan prezon por la NOREK-Esperanto-Konferenco.

Adreso de la konferencejo: La Mary Winspear Community Cultural Centre, 2243 Beacon Avenue, Sidney, BC.

La Urba Teatro kaj Koncertejo "Charlie White" estas en La Mary Winspear Community Cultural Centre. La koncerto de Joelle Rabu komenciĝos je la 7-a horo la 28-an de septembro.

Kontribuita de Olga Du Temple

Programo: Kompreneble la unua ero estas la konferenca temo pri la graveco de "Arbaroj". Sed poste multe dependas de vi la partoprenantoj, kiuj venas pretaj kontribui el viaj spertoj kaj talentoj.

Ĉijare ni intencas havi unu iom nostalgian programeron, eble 2-3 horan, kies okazigo - kaj sukceso - tute dependos je la partoprenantoj, t.e. Je Vi.

La mondo neoficiale festas la 100-jaran datrevenon de la tago, kiam La Unua Pluŝa Urseto aperis en Novjorka ludil-vendejo. Ekde tiam, diversgrandaj kaj diversvilaj pluŝuloj apartenas al infanaĝo (certe) kaj plenaĝo (?...) en pli

malpli ĉiuj mondpartoj.

Pripensu kaj provu rememori, ĉu iu urseto helpis Al Vi dum krizaj tempoj, ĉu iu akompanas vin ĝis nun, ĉu iu estis donacita al vi de amata parenco ... Skribu tion, kaj pretiĝu prezenti vian verketon.

Se vi alportos sufiĉe da amindaj, amuzaj kaj kortuŝaj rakontoj, ni poste kompilos pluŝ-ursan E-antologion. Verkis Olga Du Temple

Kaj Wally Du Temple memorigos vin kunporti viajn pluŝulojn por komuna fotado.

Aliĝilo por NOREK

Sendu viajn aliĝilon kaj pagon al Wally Du Temple, 765 Braemar Avenue, North Saanich, BC, V8L 5G5, Kanado.

Donu vian plenan nomon, adreson, poŝtan kodon kaj retroŝtan adreson.

Sendu \$30.00 Usonajn dolarojn aŭ 45.00 kanadajn dolarojn.

Estas nur unu prezo sed ĝi rajtigas vin al:

1/ partopreno ĉe la urba teatro por la koncerto de Joelle Rabu.

2/ partopreno en ĉiuj konferencejaj sesioj kaj salonoj.

3/ eniro ĉe la Interkontiĝa Vespere, kaj manĝoj kaj trinkaĵoj tie servitaj.

4/ Kredito de \$10.00 kiel kontribuo al la kosto de la de vi mendita mangajo ĉe la Oficiala Bankedo

La organizanto de la Nord-Okcidenta Esperanto-Konferenco estas

Wally G. Du Temple. Lia retroŝta adreso estas <iwolemskatl@aol.com>

Vi povas ankaŭ kontakti lin per telefono kaj fakso:

telefono: 1-250-656-1767 kaj fakso: 1-250-656-0502

Mi kore anticipas vian partoprenon,

Wally G. Du Temple

daŭrigata de paĝo 2 (PREZ)

this, the Movement lacks the publicity – the outreach — necessary to tell people about Esperanto. We need to work on all of these: we can't make progress on any one of them without progress in the others. I will encourage ELNA to work on these three areas." I think this is still too true for our organization.

Congratulations to all our new Board members. And my best wishes to our new President, Alex Shlafer, and Vice-

President, Phil Dorcas. I'll be doing my best to help them and ELNA. Please do *your* best to help them, too. Esperanto and ELNA deserve your best.

Thanks —

David Wolff, *Ex-*President
<dwolff@panix.com>
(978) 264-0286 (8-10pm Eastern time weekdays, noon-5pm weekends)

NEW FROM THE BOOK SERVICE

To order books from ELNA: (1) Send order by regular mail, with check or credit-card number and expiration date, to: ELNA Book Service, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530; (2) Order on-line with credit card at <http://www.esperanto-usa.org/retbutiko.html>

Note: if you order with payment by credit card and the book you want is not in stock, we will back-order it for you and charge your card only when and if it comes back into stock. This service is not available for payments made by check.

Amata lando. A collection of 19 Esperanto songs popular among Russian and other formerly Soviet Esperanto speakers. Includes campout, drinking and folk music from various countries. Second part of a CD pair, *Oraj kantoj*. CD. NEW.

AMA002 \$15.00

Australia Felix. Trevor Steele. Eleven stories ranging in length from short-short to novella and concentrating on the major anomalies in the Australian life-style and the historical treatment, and its current results, of the Australian aborigine. 1999. 132p. 230x150. Paper. Austria. IEM Series "Originala Literaturo" #29. ISBN 3-901752-15-3. NEW TO ELNA.

AUS004 \$15.30

Avinjo. Peter Härtling. Translated by Nora Caragea, illustrated by Peter Knorr. A series of episodes in the life of a German boy who, after his parents are killed, goes to live with his elderly grandmother, and how the two of them learn to bridge a huge generation gap. 2000. 79p. 210x150. Paper. Germany. ISBN 3-00-006168-1. NEW.

AVI002 \$11.50

Avo en la ĉareto, La. Gudrun Pausewang. Translated by Nora Caragea, illustrated by Inge Steineke. An old man who feels that he has nothing left to live for is taught by his grandson and others around him that life is still worth living. 1999. 63p. 200x130. Bound. Germany. ISBN 3-00-004992-4. NEW TO ELNA.

AVI002 \$11.50

Batalo de l' vivo, La. Charles Dickens. Trans by L. L. Zamenhof. One of Zamenhof's earliest translations from English literature (it preceded his *Hamlet* by three years) of one of Charles Dickens' shorter and lesser-known works. 1982 (reprint). 93p. 200x145. Paper. Germany. NEW

TO ELNA.

BAT002 \$7.40

Beleco de Merab, La. Torgny Lindgren. Translated by Sten Johansson. Nine short stories with a religious bent looking back to life in northern Sweden in the first half of the 20th century, by an award-winning Swedish author. 1995. 80p. 210x150. Paper. Sweden. NEW TO ELNA.

BEL002 \$6.30

Ĉu ŝi mortu tra-fike? Johán Balano. The fifth adventure of police detective Jano Karal, this time involving ... oh, sorry, I can't say in a family-oriented magazine. 2000. 74p. 230x150. Paper. Austria. IEM Series "Originala Literaturo" #32. ISBN 3-901752-18-8. NEW.

CUS001 \$12.60

Ĉu vi kuiras ĉine? Johán Valano. The first of the adventures of police detective Jano Karal, his psychologist wife Ĝoja and their nephew Stefano, this time in the hunt for the murderer of a young revolutionary. 1996. 135p. 230x150. Paper. Austria. IEM Series "Originala Literaturo" #20. ISBN 3-901752-02-1. NEW TO ELNA.

CUV002 \$14.10

Denaska kongresano kaj aliaj noveloj. Sten Johansson. Nine early short stories by a recent master of the craft. All are enjoyable, but two in particular -- "Nils Lapono", a jaundiced view of how history is written, and "La viro kiu restos", a vignette which seems by its style to come from a very unusual language textbook, are worth the price of admission by themselves. 1992. 46p. 210x145. Paper. Sweden. ISBN 91-630-1344-4. NEW TO ELNA.

DEN001 \$4.20

Doktoro Glas. Hjalmar Söderberg. Translated by Sten Johansson. A novel about a murder committed with

the best of intentions. 1997. 88p. 210x150. Paper. Sweden. ISBN 91-973467-2-1. NEW TO ELNA.

DOK002 \$7.30

Dormanta grafino, La. Ivan G. Štrjaev. Twelve short stories and novelettes by one of the earliest and best Esperanto prose stylists. Includes "Venĝo", which was chosen for the short-story collection *Trezoro*. 1993. 157p. 240x170. Paper. Austria. ISBN 3-85182-021-5. NEW TO ELNA.

DOR002 \$13.40

Duakanonaj libroj, La. Translated by Gerrit Berveling. The first of two volumes containing Biblical books omitted from the Protestant Bible and the "complete" Esperanto bible; this volume contains the books of Tobit, Judith, Esther, and 1 and 2 Maccabees. Includes a prologue, general introduction to the Bible, and annotations by the translator. Illustrations by Gustav Dore. 2001. 263p. 210x130. Paper. Brazil. NEW.

DUA002 \$19.70

En la realo troviĝas truo. Torgny Lindgren, Peter Nilson, Inger Edelfeldt, Marie Hermanson, Cecilia Davisson, Niklas Rödström. Translated by Sten Johansson. Two stories each by six modern Swedish authors. The stories are chosen to represent a style of writing similar to "magical realism" -- "the ability," according to the translator, "to find or disclose, in the midst of reality and daily life, a door to another world". 1996. 84p. 210x150. Paper. Sweden. NEW TO ELNA.

ENL002 \$6.30

Eraro. Stig Jacobson. Illustrated by Kurt Frisk. Ten short stories about unusual people faced with unusual events. The author "wanders on a journey of exploration through the dark levels of the human subconscious" (Yenovk Lazian). 1998. 52p. 210x150. Paper. Sweden. ISBN 91-

973467-1-3. NEW TO ELNA.

ERA001 **\$5.60**

Falantaj muroj. Trevor Steele. A peregrinating Australian Esperantist describes his experiences in the Soviet Union and Eastern Europe in the period just before the collapse of the Soviet empire. Includes many amusing anecdotes about life in that part of the world. 1997. 160p. 230x150. Paper. Austria. IEM Series "Originala Literaturo" #21. ISBN 3-901752-04-X. NEW TO ELNA.

FAL004 **\$15.30**

Falĉita kiel fojno. Sten Johansson. A realistic murder mystery, the first adventure of detectives Svedberg and Jankéus. Jorge Camacho says that "Johansson writes in the good language which he masters with the expressiveness, elasticity and elegance of -- why not? -- Trevor Steele". 1997. 76p. 210x150. Paper. Sweden. NEW TO ELNA.

FAL003 **\$6.80**

Fermita konko, La. Julian Modest. 18 short stories by a well-known author of novels and short stories in Esperanto. In the short story "La kaverno" we read: "We all leave signs on the walls of the caverns, but not all who follow us can decipher our signs." Here is where Julian Modest has left his signs. 2001. 80p. 210x150. Paper. Sweden. ISBN 91-89432-05-3. NEW.

FER002 **\$6.30**

Fermita urbo, La. István Nemere. In the 26th century, in the megalopolis, people are disappearing. A new edition of Nemere's first published novel in Esperanto. 2000. 158p. 230x150. Paper. Austria. IEM Series "Originala Literaturo" #33. ISBN 3-901752-19-6. NEW.

FER003 **\$15.60**

Fotoalbumo, La. Trevor Steele. The first volume of the chronicles of the O'Shea family of Queensland, Australia, as shown in a collection of short pieces built around photographs from their family album. Written in "living, normal Esperanto" (Sten Johansson). 2001. 366p. 230x150. Paper. Austria. IEM Series "Originala Literaturo" #39. ISBN 3-901752-26-9. NEW.

FOT001 **\$24.90**

Inferio. Hindrik Jan Bulthuis. Three young men who grew up in a "country of the blind" are given sight and exposed to the modern world in this 1938 original science-fiction novel. 1990. 153p. 200x145. Paper. Austria. NEW TO ELNA.

VIL001 **\$11.40**

Inter tero kaj ĉielo. Benjamin Jacobsen. Translated and adapted by Sten Johansson. What happens when two brothers sell their six-year-old sister as a white slave? One of five stories by a well-known Danish author, now rendered into simple Esperanto (only 607 morphemes used in the book) primarily for the use of advancing students. 1997. 38p. 210x150. Paper. Sweden. NEW TO ELNA.

INT005 **\$4.50**

